Paco, nun revenu!

Nuboj alte en la ĉiel'
flugas trans la limojn,
flugas trans la limojn.

Ankaŭ birdo kaj anĝel'
zorgas ne pri la bariloj.
Eĉ la sun' kondutas tiel
brilas pli ol la kandel'.

Nur la homoj kreas murojn,
vivas en malamikec',
faras krimojn kaj torturojn,
Sed por pats' mankas firmec'.

Por armiloj estas mon'.
Propagando unison'.
Malamik' iĝas demon'.

Komenciĝu la milit'.
Komenciĝu la milit'.
Suferoj, mortoj kaj profit',
Funebro, larmoj sen limit'.
Tamen daŭras la milit'.

Nuboj alte en la ĉiel'
flugas trans la limojn,
flugas trans la limojn.

Ankaŭ birdo kaj anĝel'
ne zorgas pri bariloj.
Eĉ la sun' kondutas tiel
brilas pli ol la kandel'.

Nur pardono montras vojon,
por la savo el infer'.
Ni malligu nun la nodon.
Liberiĝo de l'mizer'.

Ĉiuj baroj malaperas.
Eĉ foriĝas la malam'.

Paco povas komenciĝi.
Paco, nun revenu!

Paco povas komenciĝi.
Paco, nun revenu!

Nuboj alte en la ĉiel'
flugas trans la limojn,
flugas trans la limojn.

Paco, nun revenu!

Teksto: Klaus Friese (pseŭdonimo Erik Tantal)
Melodio & Kantado:
https://suno.com/s/x9IADxsF0HAhN2NJ